# CARLAND Cross

M. OLEFFE
O. GRENSON

## 7 LA PENDUMITOJ DE MANHATANO



ESPERAĴO

**Originala titolo:** *Carland Cross 7: Les pendus de Manhattan*
**Aŭtoroj:** Michel Oleffe, Olivier Grenson
**Jaro de originala publikigo:** 1998

Cifereca eldono de Studio Esperaĵo, februaro 2026
**Esperanta traduko kaj kompostado:** Mikaelo Kastro




BAKA... MIA NOMO ESTAS BAKA... MIA REGNO ESTAS LA NOKTO, SANGO KAJ MALĜOJO. HOMOJ ESTAS MIAJ SKLAVOJ, KAJ MI ENIGAS LA FAJRON EN LA PLEJ PROFUNDAN PARTON DE ILIAJ KORPOJ...
BAKA AÍ'S NE VAÍ ZE ...
BAKA AÍ'S NE ROÍ GE ...
NE STEÍ KVA MA E GE ZÂ DÛ'D ...
MIA LOĜEJO ĈIAM ESTIS LA NIGRULAJ MENSOJ KAJ KOROJ. DANKE AL ILI, MI TRANS-SALTIS LA MARON KAJ AL-VENIS EN LA GRANDAN IN-SULON, KAJ MI KUNPORTIS MIAJN VODUAJN SPIRITOJN... ILI NOMIĜAS FA, LEGBA, DAMBALA WÈDO, AYIDA WÉDO, GU, SAKPATA, AGWE, BRES ...
MI NUTRAS MIN PER LA SANGOJ DE NIGRA PORKO KAJ RUĜA KOKINO. MI NUTRAS MIN PER OFERAĴOJ, DOLORO KAJ MORTO. MALBENO TRAFOS TIUJN, KIUJ RIBE-LOS KONTRAŬ MI, KAJ ILI NE POVOS TROVI RIPOZON, EĈ NE POST FORPASO. BAKA ESTAS PLI FORTA OL MORTO MEM...
MI VENIS EN LA NORDAJN URBOJN, KIE HOMOJ NE PLU KREDAS. KAJ MI ALPORTIS AL LA TIEAJ HOMOJ LA FLAMON, KIU BRULAS EN MI. LA FLAMON, LA FLAMON...
LA FLAMON...
1.
BAKA AÍ'S DOU. GAÍ'D NOK NÍ KSGE ZÉN ...


TIUJ SEVERAJ VORTOJ MALFERMAS LA TERURAN AFERON PRI LA MANHATANAJ PENDUMITOJ, GESINJOROJ. TEMAS PRI UNU EL LA PLEJ STRANGAJ AFEROJ, KIUJN CARLAND CROSS DEVIS KLARIGI. MI NE LUDIS TAŬGAN ROLON ĈI-OKAZE. LA VIVO DE DETEKTIVO-LERNANTO NE ĈIAM ESTAS GLATA, DOMAĜE.
MIA MAJSTRO ESTIS TRE AFEKCIITA POST LA AFEROJ PRI «LA VAMPIRO DE KVARTALO SHADWELL» KAJ «LA FANTOMO DE LA BRITA MUZEO», KIUJN NI ĴUS SOLVIS. LI DECIDIS RESTI KELKAJN TAGOJN EN LONDONO DUM MI VOJAĜIS AL NOVJORKO POR EKZAMENI LA TERENON, ĈAR ONI ALVOKIS LIN POR SPECIALA ESPLORO. SED MI NE PAROLU ANTAŬTEMPE...
DRUGS
DENTIST
PRESCRIPTIONS

2.


DIT ON
MONDAY DECEMBER 2 1937
UNU PLIA PENDUMITO EN MANHATANO
LEGU «LA VESPERA STELO»! NOVA RITA MURDO EN MANHATANO! EKSCIU LA DETALOJN EN «LA VESPERA STELO»!
SPIRIT
PHOTOS ABBOTT
ĈI TIO... NE EBLAS...!
12c
Evening Star
MONDAY DECEMBER 2 1937
Encore un Pendu à Manhattan!

3.


HE, SINJORO FAIRBROOK!
SINJORO FAIRBROOK! IU ULO DEMANDIS PRI VI! SINJORO... MI... SED, KIA MUŜO EKZUMIS EN LIA KAPO?

4.




AL MI ŜAJNAS, KE LI PRETAS PAROLI, FRAŬLINO HARRISON.
NAÍWÉ DATOU AÍ'S ...
NEEE!



HEBREW BOOKS & TALEISM
53
NOVJORKO BOLIS DE VIGLECO KAJ KLAĈOJ TIUN DECEMBRAN TAGON. MI SENFRUKTE KLOPODIS KONTAKTI SINJORON JONAS FAIRBROOK. LI ESTIS UNU EL LA BANKISTOJ DE LORDO BLACKBURN. MALPLENMANE MI DIREKTIĜIS AL LA DETEKTIV-EJO PINKERTON, KIE CARLAND CROSS HAVIS KORESPONDANTON.
LA ĴURNALOJ ESTIS PLENAJ DE TIUJ RAKONTOJ PRI RITECAJ MURDOJ. TIEL MI EKSCIIS PRI LA KOMPATINDA VIRO, KIUN MI SERĈADIS.
OPTIM
LA POLICO ESTAS TRE MALTRANKVILA. LE-GU «OBSERVISTO»!
OKAZIS UNU PLIA MIS-TERA MURDO, LEGU LA...
The OBSERVER
MEURTRE HORRIBLE
PINKERTON
324
DETECTIVE AGENCY


SALUTON, DWIGHT.
HO, ANDY WHITE! KOINCIDE, MI HAVAS ION NOVAN POR VI...
ĈU MIA MAJSTRO SENDIS LETERON?
BEDAŬRINDE NE. SINJORO CROSS ESTAS TRE DISKRETA. TIO ES-TAS BONA TRAJTO POR DETEKTIVO, VERDIRE.
TAMEN, MI AKIRIS ION, KIO INTERESOS VIN: LA LASTAN KONATAN ADRESON DE FRAŬLINO ELAINE HARRISON.
ESPEREBLE MI ESTOS PLI BONŜANCA OL MI ESTIS ĈE SINJORO FAIRBROOK. HIERAŬ MI IRIS AL LIA DOMO, SED LI NE ESTIS TIE... KAJ ĈI-MATENE MI EKSCIIS, KE ANKAŬ LI ESTIS PENDUMITA...
NU, NIA METIO JA KONSISTAS EL ELREVIĜOJ KAJ PACIENCO.
ĈU VI AKOMPANOS MIN?
PARDONU, MI HAVAS URĜAĴON SOLVENDAN. SED LA VIRO, KIU DONIS AL MI LA ADRESON ESTAS FIDINDA ULO.

7


HOTEL
WHITEHALL
NE ESTAS REKOMENDINDE RESTI ĈI TIE DUM MULTE DA TEMPO, JUNULO!
Nº13
SR 69.30
F-INO HARRISON?
?!!


EN LONDONO...
EN LA LOĜEJO DE LORDO BLACKBURN, PREZIDANTO DE LA ŜPARBANKO WESTMINSTER.
RESUME, SINJORO CROSS... MALAPERIS LA MONO, KIUN MI ORDONIS MOVI DE UNU NOVJORKA BANKO AL ALIA, POR PLENUMI TRE DELIKATAN BORSAN OPERACION. BEDAŬRINDE POR MI, LA KONFIDENCA KARAKTERO DE MIA FINANCA ARANĜO MALHELPAS TION, KE MI PERSEKUTU LA ŜTELISTOJN PER LAŬLEĜAJ RIMEDOJ...
ĈU VI RICEVIS IUN NOVAĴON PRI FRAŬLINO ELAINE HARRISON? DUM NIA LASTA INTERPAROLO, MI KONSILIS AL ŜI RENKONTIĜI KUN MIA KORESPONDANTO ĈE AGENTEJO PINKERTON, SE MI NE MISMEMORAS...
DOMAĜE, FRAŬLINO HARRISON, SUR KIUN MI METIS ĈIOM DA MIA KONFIDO, ANKAŬ MALAPERIS TUJ POST ŜI VENIS EN NOVJORKON.
MI JAM PETIS AL MIA METILERNANTO, ANDY WHITE, KE LI IRU TIEN UNUE POR PRIZORGI ĈION... MI ATENDAS RICEVI NOVAĴOJN EL LI DUM LA SEKVAJ HOROJ.
SINJORO CROSS, MI NE POVAS NEI AL VI, KE LA PUBLIKIĜO DE ĈI TIU AFERO SIGNIFUS LA FINON DE MIA POSTENO ĈE LA BANKO, KIUN MI PREZIDAS.
NE MALTRANKVILIĜU, LORDO. MI MEM CELAS VOJAĜI EN NOVJORKON POST KELKAJ TAGOJ.
TIO RAVAS MIN, SINJORO CROSS, SED MI PETAS JE LA NOMO DE DIO... ESTU RAPIDA!
9.



ĈU VI HAVAS NOVAÎOJN PRI ANDY, SINJORINO STONE?
NE, SINJORO...
SED ĈI-MATENE ALVENIS EKSPRESA LETERO EL USONO!
MI AROGIS AL MI FORTRANĈI LA POŜTMARKON POR MIA KARA AMIKO, SINJORINO DUMPHREY!
DIO MIA!
LETERO SENDITA DE DETEKTIVEJO PINKERTON... ANDY MALAPERIS! FORBRULIS LA DOMO, KIE ONI VIDIS LIN LASTAFOJE!
IO TIA JA DEVIS OKAZI FRUE AŬ MALFRUE... MIA KOMPATINDA ANDY, KIAL LI NE ELEKTIS LABORON TAŬGAN POR ĜENTLEMANO?
LA POLICO NE TROVIS KADAVROJN INTER LA RUBO DE LA FORBRULINTA DOMO. EBLE ANDY ESKAPIS EL TIU KATASTROFO...
KIAL LI HAVIS LA BEZONON IRI AL USONO? TIU LANDO DA SOVAĜULOJ, KIUJ NE SCIPOVAS SURTABLIGI VARMETAN BIERON... ANDY, HO! ANDY... NUN KIU KAŜMANĜOS MIAJN BENJETOJN FARĈITAJN PER SEBO?
ĈU VI BONVOLUS ENKOFRIGI MIAJN HAVAÎOJN, SINJORINO STONE? MI TUJ FORIROS!
REVENIGU ANDY-ON, SINJORO CROSS. REVENIGU TIUN KOMPATINDAN JUNULETON!
10.





*«Je la Virgulino... Kia komedio nun...»



NI FORIRU. MI SUFIĈE SPEKTIS TIUN MASKERADON...
VENIS EN MIAN MENSON LA BILDOJ DE BARBARAJ FESTOJ KAJ ABOMENINDAJ RITOJ, KIUJN MI NE POVIS REZISTI.
EK, ANDY!
PÔÔÔÔT
PÔÔÔT
PÔÔT

12


MIRINDA VIDAÎO, ĈU NE?
?
MI FORGESIS PREZENTI MIN... TEAL... ABEL TEAL, PRELEGISTO.
DETEKTIVO CROSS. ESTAS PLEZURO.
DETEKTIVO, ĈU? HO, MI ĴUS EKKONIS SINJORON HARRY DICKSON, DO!
KIO ESTAS LA OBJEKTO DE VIAJ PRELEGOJ, SINJORO TEAL?
AFRIK-KARIBAJ KULTOJ... ĈEFE VODUO!
ĈU TIAJ AFEROJ INTERESAS NOVJORKANOJN?
TIAJ AFEROJ FASCINAS ILIN. VODUO ESTAS NEKREDEBLE DISVASTIĜINTA EN LA NI-GRULAJ KVARTALOJ. MALRIĈULOJ TREMAS KAJ RIĈULOJ NUR PROFITAS!
QUEEN MARY
MI PAROLAS SENĈESE, KAJ LA ŜIPO JAM ALTERIĜIS... HAVU MIAN VIZITKARTON, SINJORO CROSS. VENU AŬS-KULTI MIN IUN TAGON.
Abel A. Teal
lecturer
Afro-American cults
&
Superstitions
32 321 62
13


KIE MI LASU VIAN VALIZON, SINJORO?
ĈE LA ELIREJO. ONI VENOS RENKONTIĜI KUN MI.
CROSS... ĈU IU DWIGHT DEMANDIS PRI MI?
NE, SINJORO, MI BEDAŬRAS.
S-RO CROSS!
MI PROPONAS AL VI KUNDIVIDI MIAN TAKSION. NI POVOS DAŬRIGI LA BABILADON!
DANKEGON, SED MI BEZONAS IRI AL LA OFICEJO DE MIA KORESPONDANTO.
DOCKS
TAXI
TAKSIO!
KIEN VI VOLAS IRI, PRINCO?
AL DETEKTIVEJO PINKERTON.
SKY-VIEW
ANTAŬEN! HU RA!

14.


LI ĴUS ENIRIS EN TAKSION POR IRI AL DETEKTIVEJO PINKERTON.
TIU CROSS... LI ĈIAM ESTAS TIEL RAPIDAGA... GVATU LIN ZORGEME. LA MAŜINARO JAM PRETAS. HA HA HA HA!
ĈU VI DO ESTAS DETEKTIVO? NU, SE VI CELAS TRANSLOĜIĜI EN NOVJORKON...
VI HAVOS MULTE DA LABORO!
JES, SED NE NUR... ĈU VI RIMARKIS? NUR BANKISTOJ. LA POLICO MALŜATAS TION, ĈAR ĴURNALISTOJ NENIAM PRIDEMANDIS ILIN KIAM LA VIKTIMOJ ESTIS SIMPLAJ MALRIĈULOJ.
TAXI
SKY-VIEW
ĈU VI PAROLAS PRI LA PENDUMITOJ?
SE VI BEZONAS TAKSION DENOVE, NE HEZITU... MI ESTAS LA PLEJ BONA EL NOVJORKO. MI NOMIĜAS WOODY.
DANKON, WOODY!
BONVENON EN NOVJORKO, SINJORO CROSS.
15.


MI ESTAS ELMER DWIGHT! MI NE POVIS BONVENIGI VIN ĈE LA HAVENO. VI SCIAS, KE LABORO ESTAS TIA!
ĈU VI SCIAS IUN NOVAÎON PRI LA MALAPERO DE ANDY?
NE... LA POLICO ESTAS SENSCIA, KIEL KUTIME.
KIUN SPURON SEKVIS ANDY ANTAŬ OL LI MALAPERIS?
LI ESPLORADIS SERION DA STRANGAJ MURDOJ. PENDUMITAJ BANKISTOJ, KIES KORPOJ ESTIS TROVITAJ EN TRE BIZARAJ SCENEJOJ. ANDY KREDIS, KE TIUJ MURDOJ RILATIS AL LA MONO DE LORDO BLACKBURN...
PARENTEZE, KIE ESTAS ELAINE HARRISON?
NE EBLAS TROVI ŜIN. ESTAS KVAZAŬ ŜI FORVAPORIĜIS... NU, JEN LA DOSIERUJO DE ANDY.
KION SIGNIFAS TIUJ STRANGAJ AÎOJ ĈIRKAŬ LA KADAVROJ?
VERŜAJNE TIO ESTAS LA RESTAÎO DE VODUA CEREMONIO. SENKAPIGITAJ KOKINOJ, KANDELOJ KAJ TIEL PLU... LA POLICO ESTAS TUTE SENSCIA, ĈAR ILI NE ESTAS FAKULOJ PRI RITAJ MORTIGOJ.
SED... KIEL RILATAS VODUO AL ĈIO ĈI?


MI TUTE NE SCIAS. MI KONSILAS, KE VI VIZITU LA POLICON.
MI ALPORTOS VIAN VALIZON AL LA HOTELO, SINJORO CROSS...
DANKON, DWIGHT!
NEW METROPOLITAN POLICE
LEŬTENANTO BUKOVINSKI?
MI ESTAS TIU. VI ESTAS CARLAND CROSS, ĈU NE? DWIGHT SCIIGIS MIN PRI VIA VIZITO.
JEN LA RAPORTO PRI LA FAJREGO, DUM KIU VIA HELPISTO MALAPERIS. NI HAVAS LA ATESTON DE LA TAKSIISTO KAJ FOTOGRAFAĴOJN DE OBJEKTOJ TROVITAJ INTER LA RUBO.
KIO DIABLE ESTAS ĈI TIO?
JEN UNU EL TIUJ VODUAJ AĴETOJ, IU STATUETO... ĜI IEL MALAPERIS POST ONI FARIS LA FOTOGRAFAĴON. NENIU KOMPRENAS ĈION ĈI!
ĈU LA FAJREGO POVAS RILATI AL LA RITAJ MURDOJ, PRI KIU PAROLAS LA GAZETARO?

17


MI NE SCIAS. NI KUTIME OKUPIĜAS PRI RABOJ KAJ DROG-ŜAKRADO, VI KOMPRENAS!
SE LA AFERO INTERESAS VIN, JEN MALNETO ENTENANTA LA INFORMON PRI LA PENDUMITOJ. ONI KOLEKTIS TIOM, KIOM ONI POVIS, SED ONI ANKORAŬ DEVAS DEMANDI LA KVARTALAJN POLICEJOJN PRI IUJ DETALOJ.
ĈU MI RAJTAS FORPRENI TIUN DOSIERUJON?
JES... NU, NI JA NENION KOMPRENAS PRI LA TUTA AFERO.
U.S. MAIL
Coca-Cola
4Y-123
HE, WOODY! ĈU VI POSTIRAS MIN?
NUR KOINCIDO, SINJORO! PLI-MALPLI... WOODY ĈIAM ESTAS TIE, KIE ONI LIN BEZONAS. ĈU VI VOLAS IRI AL HOTELO?
NE. MI VOLAS, KE VI VETURIGU MIN AL TIU ADRESO...
123 W 164th St.
LA HAITIA KVARTALO... DANĜERA LOKO, PLENA DE STRANGAJ HOMOJ.
HOTEL
FUR
18.


JEN LA LOKO. AŬSKULTU... ONI DONIS AL VI TRE STRANGAN ADRESON. MI ATENDOS VIN ĈI TIE, ESTOS PLI SEKURE.
lé ma tounen ma salyié
MORTO, FREMDULO, MORTO... LA MANO DE BAKA TROVIĜAS SUR VI...

19







*Ŝi eldiras preĝon al helpa spirito nomata Lwa, por ke ĝi malfermu pordojn.

Ŝi identigas sin kiel ino, tamen ŝi uzas la terminon «oungan» por si mem, kvankam tio signifas «pastro specife vira». La termino por pastrino estas «mambo».




MI AVERTIS VIN JAM. STRANGA KVARTALO!
BAKA, BAKA, BAKA!
IOM POSTE, WOODY VETURIGIS CARLAND-ON AL LA HOTELO.
JEN VIA ĈAMBRO, CROSS. IU DWIGHT ALPORTIS VIAN VALIZON.
FILE 17
CONFIDENTIAL
NEW YORK CITY POLICE DEPARTMENT
BONE... ONI LEGU LA DOSIEROJN...
ABE SLINGERTON, ASISTANTO DE LA DIREKTORO ĈE LA METROPOLA BANKO... BARNABAS COLLINS, KOMISIISTO ĈE LA NOVJORKA BANKO... EDWIN PORTER, ŜPARBANKO DE STRATO WALL. NU! ĈIUJ PENDUDUMITOJ ESTAS KORESPONDANTOJ DE LORDO BLACKBURN!
Abe Slingerton
Barnabas Collins
Edwin Porter
Jonas Fairbrook
HA LO? ĈU LA POLICEJO DE LA 18-A AVENUO?
MI VOLAS PAROLI KUN TIU, KIU ESPLORAS LA MURDON DE SINJORO FAIRBROOK.
ANKAŬ JONAS FAIRBROOK ESTIS BANKISTO, KAJ LI ESTIS KORESPONDANTO DE LORDO BLACKBURN!
?!
DIO MIA!
21


ONGUN FERAY!
HAHAHA
22


LA BILDO!
BAKA!
AAAAAA!
AAAAAAAA!
CRRRR


STRANGA AFERO, SINJORO CROSS... SUB VIA FENESTRO ONI TROVIS NENIUN ULON KUN CILINDROĈAPELO. ANKAŬ NE ESTAS KUGLOMARKOJ... ĈU VI CERTAS, KE VI NE DRINKIS TRO MULTE?
MALFACILAĴOJ, ĈU?
S-RO TEAL, KIAL VI ESTAS ĈI TIE?
2 FLOOR
LIFT
ĈI-VESPERE MI FAROS PRELEGON EN LA SALONO DE LA HOTELO, ĈU VI VOLAS AŬSKULTI MIN?
RILATE AL TIO, MI VOLAS MONTRI ION AL VI...
JES, TUTE EN ORDO!
ENVENU...
JEN «WANGA», MAGIAJ PUPETOJ. ILI ENTENAS SUPERNATURAJN POTENCOJN, KAJ PER ILI ONI POVAS PRISORĈI MALAMIKOJN.
NIAJ OKCIDENTAJ MENSOJ KUTIME FORNEAS TIAJN MALICAJN SORĈOJN, SED MI STUDIS TRO MULTE TIUJN TE-MOJN... MI JA KREDAS JE ILI. SE MI ESTUS VI, MI DETRUUS ILIN.
24




*«Bonan vesperon, mia amiko»


KIAL MAFIO KUNLABORAS KUN HAITIA BANDO?
TION MI ANKORAŬ NE SCIAS. SED MI HAVAS MIAJN INFORMANTOJN. ESTU ZORGEMA, TIUJ ULOJ HAVAS KOMPLICOJN EN LA POLICO. PLI SPECIFE, ILIA ESTRO HAVAS KOMPLICOJN.
ĈU VI PAROLAS PRI LUCIANO?
NEPRE NE!
LUCIANO ESTAS TRO KRUDA, NE. KROME, LI ĈIAM KAŜIĜAS... TEMAS PRI GRANDA PLANO, CROSS. ESTU ATENTA.
ĈI-NOKTE MI RICEVOS PLI DA INFORMO. ONI AGU TRE PRUDENTE, CROSS. MI RISKAS ENDANĜERIGI MIAN INFORMANTON... ĈU VI VOLAS NOKOJN?
DANKON, SINJORO LUIGI, SED MI DEVAS DAŬRIGI MIAN ESPLORADON... ANDY MALAPERIS.
KOMPATINDULO. MI ESPERAS, KE NENIO MALBONA TRAFIS LIN.
LI MALSUKCESIS! SED KIEL?! TIU SENTAŬGULO HAVIS NUR UNU FACILAN TASKON! PROBABLE CROSS JAM MALTRANKVILIĜIS!
LI VIZITIS LA ITALAN KVARTALON... JES, LI IRIS AL SINJORO LUIGI!
BONEGE! SEKVU LIN, KAJ PLENUMU LA DUAN PLANON KIAM LI ELIROS!
26.


ĈU LA PASTAĴOJ ESTAS BON-GUSTAJ?
TIUJ DIABLAJ ITALOJ DEVIGIS MIN MANĜI ĈI TIUN AĈAĴON... MI DONUS ION AJN POR MANĜI BOVAĴAN SANDVIĈON NUN!
ĈU VI POVUS VETURIGI MIN AL ĈI TIU LOKO, WOODY? EN LA HAITIA KVARTALO...
DENOVE!
ĈU VI CERTAS, KE VI VOLAS RESTI SOLA EN ĈI TIU AĈA LOKO?
MI BEZONOS NUR UNU MO-MENTON... MI TROVOS LA MANIERON REVENI...
FORTO EN VIAJ OSTOJ. VIAJ OKULOJ SIMILAS UNGEGOJN... LA NIGRA STELO AKOMPANAS VIN... DAMBALA WEDO, ESTU BONA, ESTU BONA...


OUNGAN BRIGITTE ATENDADIS VIN...
ĈU VI SCIAS, KIO ESTAS ĈI TIO?
GEN MOUN KA KRIYE... OUNGAN BRIGITTE... TIMO, FAJRO, MORTO...
PAROLU AL MI PRI LA JUNA BLONDULO.
TIO NE ESTAS BONA POR LI... KAPTITO... GRANDA SORĈISTO, MALICA VIRO... GRANDA VÉVÉ... BLANKA VIRINO BONA.
ĈU VI POVAS DETRUI TIUJN PUPOJN LAŬ LA RITOJ?
BARON SAMEDI... OUNGUN FERAY... SPIRITOJ TRO POTENCAJ... BRIGITTE NE POVAS!
ĈU ĈI TIO POVOS TRANKVILIGI LA SPIRITOJN?
BONA MONO... BRIGITTE BONA...



?!
PAW PAW PAW
NE... TIO NE EBLAS!
PAN
PAW PAW
BARONO CIMETIÈRE, BARONO LA CROIX.
DANKU VIAN AMIKON WOODY. LI ESTIS TIU, KIU PETIS AL MI HELPON! IAM VI SAVIS AL MI LA VIVON, NUN MI SAVIS LA VIAN!
S-RO LUIGI!
SED... SINJORO LUIGI...
CIAO...
PAN




*«Blanka kartoĉo» estas senkugla kartoĉo. Ĉe pafado, blankaj kartoĉoj rezultigas bruon kaj brilegon, sed neniun vundon.

IOM POSTE, KIAM LA MANHATANA KOMERCOBANKO MALFERMIĜIS.




MANHATTAN COMMERCE BANK
MANHATTAN COMMERCE BANK
TRAVEL CHECKS
PROTECT YOUR FUNDS
"The secret of success in life is for a man to be ready for his opportunity when it comes" Disraeli
ONE WAY
SHOE SHINE
SHINE
EXIT
KIE ESTAS LA DIREKTORO?
LI ESTAS EN SIA OFICEJO...
SED... SINJORO! SINJORO!
KIE ILI ESTAS?
ILI IRIS EN LA MONŜRANKEJON.
EK! VENU! NI NE MALŜPARU EĈ UNU MINUTON!
SED... TIO ESTAS PRIVATAĴO!
BONVOLU MALFERMI LA PORDON POR SINJORO CROSS, SERĜENTO.
EXIT
ĈIELO! ONI ALVENIS TRO MALFRUE!
32.





WOODY! ĈU VI NE VIDIS GRUPON DA HOMOJ, KIU ELIRIS EL LA BANKO? ĈU ESTIS VIRINO EN TIU GRUPO?
JES, ILI IRIS EN NIGRAN BUICK-AŬTOMOBILON DE 1934. ILI KRIIS, KE LA ŜOFORO VETURIGU ILIN AL KONSTRUAĴEGO CHRYSLER.
DAHLIA CONFE
DAHLIA NOIR
MAGIC LAND THEATRE
PLI RAPIDE, WOODY, PLI RAPIDE!
ĈI-FOJE MI ROMPOS BIELON, CERTE JES!
JEN! MI REKONAS LA AŬTON!
DAMNE!
!
PEPSI-COLA
5th AVE
E 32 ST
ONE WAY
DRINKS 5¢
FRANKFURTERS
BANG
TAXI
COOKIES 10¢
PCHiiiii
PRETZELS 5¢
5¢


JEN ILI!
KIEN IRIS LA PASAĜEROJ DE LA NIGRA BUICK-AŬTOMOBILO?
ILI ĴUS ENIRIS EN LA LIFTON. 62-A ETAĜO. SED...
SINJORO! TIO ESTAS MALPERMESATA!
DIO MIA!
LA HAITIANOJ ESTIS LIKVIDITAJ. ONI NE PLU BEZONIS ILIN... LA AFERO VENIS AL SIA FINO.
TIU ĈI ULO PROBABLE VENIS DE SICILIO... ĈIO EKHAVAS SENCON!
34


?
HA HA HA HA!
JAM FINIĜIS
LA MASKERADO,
KAPITULACU!
GUE ZAY'D ER
BEKA'NS KWAAAD...
35


OMPF!
ANDY?!
RRRÂÂ
SED... ANDY! ARĤ!
ARRA!
SED... KIO?!
KIO OKAZAS? KIE NI ESTAS...?


TAY'S NAGE DOON!
VERŜAJNE ONI DROGIS VIN. ĈU VI MEMORAS ION?
NUR IUJN SVAGAJN, TERURAJN BILDOJN...
EK, ONI SUKUROS VIN.
LA VIRINO... ŜI MIN PROTEKTIS!
JES JA, ANDY, KOMPRENEBLE...
SINJOROJ, KIO OKAZAS EN LA TERASO DE LA 62-A ETAĜO? ĈU SKANDALO EN KONSTRUAĴEGO CHRYSLER?
LIFT
CHRYSLER
NE TIMU SKANDALON, AMIKO. TAMEN, ONI DEVOS PURIGI MULTE. DUME, SENDU TIUN JUNAN VIRON EN MALSANULEJON, MI PETAS.
LIFT
SINJORO CROSS...
SINJORO CROSS, ILI ĴUS ESKAPIS. DU ITALOJ. UNU GRANDA, KIUN MI VIDIS ANTAŬE, KAJ...
UNUARANGA KATINO... E HEM... MI VOLIS DIRI... ĈARMA VIRINO, KIU HAVIS VALIZETON ĈEMANE.
EK, WOODY. JEN NIA LASTA TAKSIA VOJAĜO!
ILI DIREKTIĜIS AL LA ORIENTA RIVERO.
JEN ILI! MI PENSIS, KE ILI ESTUS PLI MALPROKSIME!
PROBABLE ILI HALTIS POR KE IU ELIĜU EL LA AŬTOMOBILO. PLI RAPIDE, WOODY!
MIA KOMPATINDA AŬTETO! KION MI REDONOS AL LA TAKSIFIRMAO?
37


TÛT
ILI RIMARKIS NIN!



192
POULTRY MARKET
KOSHER POULTRY MARKET
POULTRY KRAMER'S KOSHER
KLONK
MIAJ CILINDROJ EKSONAS KIEL KASTANJETOJ!
TIO NE GRAVAS, MI DUOBLIGOS LA MONDONACON!
VIAJ VORTOJ TRANKVILIGAS MIN!
TÛT TÛÛÛT
VROOOOOOOOO
FEK, SINJORO CROSS... ILI IRIS AL LA PONTO.


38.


NE MALTRANKVILIĜU, WOODY. LA MALRAPIDA TRAFIKO HELPOS AL NI ATINGI ILIN ANTAŬ OL ILI ALVENOS AL BROKLINO.
SINJORO, RIGARDU! LA BUICK-AŬTO TUJ...
STONES
BANG
INSPEC
20
21
PURE APPLE CIDER
39.


POLICE NEW YORK CITY
LA AŬTOMOBILO ESTAS MALPLENA. ONI TROVIS NEK LA PASAĜEROJN NEK LA VALIZETON.
VIA RESTADO EN NOVJORKO ESTAS CERTE VIGLA.
DWIGHT! KIA SURPRIZO!
KIEL PROGRESAS VIA ESPLORADO?
N.Y. DOCK
FAKTE... ĈIO ĈI ESTAS TRO MALFACILA POR MI. MI TROVIS ANDY-ON, MI DO KAPITULACAS.
SAĜA DECIDO. VI FARIS ĈION, KION VI POVIS FARI. VENU AL LA AGENTEJO KAJ NI DRINKOS IOMETE.
JES, SINJORO. LI KAPITULACIS. LA POLICO GVATOS LIN ĜIS LI SURŜIPIĜOS...
MIRINDE, SUPERBE! CROSS FINFINE KLINIS SIN ANTAŬ IO PLI FORTA OL LI.
JES, SINJORO. KAJ LA MON-DIVIDO?
NI ATENDU ĜIS LI FORIROS. NI DO POVOS PLILONGIGI NIAN PLEZURON.
40.


LA ŜIPO «REĜINO MARIA» ALVENIS EL LONDONO LA SEKVAN TAGON. MI ESTIS TRAVIVINTA STRANGAN SPERTON. MI NE NUR LUDIS ROLON DE SPEKTANTO, SED ALDONE MI NENION KOMPRENIS.
PÔÔÔP
NEW YORK SYSTE N.Y.O.B.
TIU WOODY ESTAS SIMPATIA ULO. NIA RESTADO ESTIS MAL-LONGA SED INTENSA.
KIEL KUNIĜAS ĈIUJ PECOJ? LA BANKOKONTO, LA VODUO... KIEL ILI RILATIS UNU AL LA ALIA? KAJ LA MAFIO?
CETERE, KIAL NI FORIRAS MAL-PLENMANE?
VI EKFARAS AL VI DEMANDOJN, ANDY. SANO EKVENAS EN VIN.
SINJORO CROSS!
ONI RICEVIS KABLO-GRAMON POR VI!
DANKON.
HA HA HA HA!
KIO... NU, KIO OKAZIS?
NIA MALAMIKO DEZIRAS AL NI BONAN VOJAĜON.
ĈU TIO AMUZAS VIN? NI FORIRAS KVAZAŬ NI ESTUS FIASKINTAJ ŜTELISTOJ, KAJ VI NUR RIDAS!
NI IRU AL MIA KAJUTO, ANDY. TEMPAS, KE VI EKSCIU KELKAJN AFEROJN. HOMO ATENDAS NIN TIE.
HO!
41.


ANDY, ŜI ESTAS FRAŬLINO ELAINE HARRISON, LA KOMISIISTO DE LORDO BLACKBURN. VI VANE KLOPODIS TROVI ŜIN.
SED... VI ESTAS LA VIRINO, KIU... LA VIRINO, KIU...
SINJORO CROSS KAJ MI ESTAS KOMPLICOJ EKDE LA KOMENCO.
NU... ELAINE TRE RAPIDE MALKOVRIS LA TROMPOPLANON. LA MONO, KIUN ONI ŜTELIS EL LORDO BLACKBURN, ESTIS METITA EN SEKRETAN KONTON. LA SENHONORAJ BANKISTOJ, KIUJ ESTIS LA KORESPONDANTOJ DE NIA KLIENTO, POSEDIS PO UNU PARTON DE LA ĈIFRO.
SED IU EKSCIIS PRI LA AFERO, KAJ TIU KOMENCIS ĈANTAĜI LA BANKISTOJN, HELPATE DE MAFIA GRUPO. LA IMPONA VODUA ENSCENIGO ĈIAM FINIĜIS PER LA TRANSDONO DE LA ĈIFROPECO, KAJ POSTE ONI PENDUMIS ĈIUN BANKISTON...
SED, KIAL VODUO?
VODUO ESTIS NUR MASKERADO POR KONFUZI LA POLICON... SUKCESA PLANO, VERDIRE. POST LA UNUAJ MURDOJ, MI DECIDIS MALAPERI KAJ ŜAJNIGI MIN AMIKO DE LA MALAMIKOJ. MI HAVIS INFORMON, KIUN ILI POVUS OPINII ALTVALORA.
ELAINE DEVIS MANOVRI PRUDENTE. ŜIA KOMISIO ESTIS JA DANGERA. LA MALBONULOJ PETIS DE ŜI PRUVON, POR SCII KE ŜI ESTIS FIDINDA.
PRUVON?
VI, ANDY.
ĈU MI, LA PRUVO?
SED KIAL VI ELEKTIS MIN?
42.


VI TUJ HAVOS RESPONDON, JUNA VIRO. VIA ESPLORO PRI LA PENDUMITOJ ESTIS TRE PROGRESINTA... MI LEGIS VIAN DOSIERON... KAJ NIA MALAMIKO ANKAŬ SCIIS TION.
MI DEVIS AKCEPTI, KE ONI PRISORĈU VIN, SED MI DAŬRE PROTEKTIS VIN NERIMARKITE. ES-TIS NECESE SPEKTI LA MORTIGOJN DE TIUJ BANKISTOJ. JEN LA SOLA MANIERO ATIN-GI LA MONON.
SED... KIEL POVIS NIA MALAMIKO SCII ĈION PRI LA AFERO, KIEL VI ASERTAS?
PERFIDULO, ANDY. KIEL EN LA PLEJ KUTIMAJ KRIMROMANOJ.
POST LA ŜTELO, TIU PERFIDULO NE HEZITIS MORTIGI LA HAITI-ANOJN KUNLABORINTAJN KUN LA MAFIO, POR EVITI SUSPEKTOJN.
SED... KIU?
IU RICEVOS BELAN SUR-PRIZON.
DUME, EN LA RIĈULA KVARTA-LO DE NOVJORKO.
ĈU LI AL-VENIS?
LI ATENDAS VIN EN LA BIBLIOTEKO.
NU, KARA AMIKO, ĈU VI HAVAS LA MONON?
LA KOMISIO ESTIS PLENUMITA, SINJORO. NI TUTE VENKIS...
43.


CROSS FORIRIS, KAJ LA POLICO PENSAS, KE LA MONO ESTAS EN LA FUNDO DE LA ORIENTA RIVERO.
MI VENKIS CROSS-ON... FINFINE! MI ESTAS LA PLEJ LERTA KRIMULO EL MIA GENERACIO!
AHAHAHAHAH AHAH!
KAJ KIO OKAZIS AL LA VIRINO?
ĈU VI PAROLAS PRI ELAINE HARRISON? MI NE HAVAS NOVAĴOJN PRI ŜI. ŜI DONIS AL MI LA VALIZETON, KAJ NI APARTIĜIS UNU DE LA ALIA ANTAŬ OL LA MAFIANOJ FALIS EN LA RIVERON... MI POSTIRIS CROSS-ON LA TUTAN TEMPON, KAJ LI NE RENKONTIĜIS KUN ŜI... MI CERTAS.
TIO NE GRAVAS! ŜI POVOS IRI IEN AJN, SED ŜI NEPRE ESTOS PERSEKUTATA DE HAITIANOJ KAJ ITALOJ, KIUJ PENSAS, KE ŜI PERFIDIS ILIN!
PAROLU, DWIGHT. RILATE AL VODUO KAJ ĈIUJ ALIAJ SENSENCAĴOJ... MI ANKORAŬ NE KOMPRENAS UNU AFERON: KIEL CROSS ESKAPIS EL NIAJ ZOMBIOJ? ĈU VI NE SABOTIS LIAN PAFILON?
JES, SINJORO. SED LI RICEVIS HELPON DE NEATENDITAJ KOMPLICOJ, VI SCIAS TION!
MURDOCK, DO!
KAJ DWIGHT, LA PERFIDULO, ESTAS LIA KOMPLICO.
LA GRANDA LUIGI, ĈU NE?
TIO NE GRAVAS! MI ĜOJAS PRI TIO, KE LI ESTAS VIVA KAJ... HONTIGITA. HA HA HA HA!
KIAM LA BANDITOJ POSTULIS, KE ONI KAPTU ANDY-ON, CARLAND EKSCIIS, KE MURDOCK ESTIS LA PLANINTO DE ĈIO ĈI. PER LA MALAPERO DE ANDY, MURDOCK POVIS ALLOGI SIAN MALAMIKEGON EN NOVJORKON.


ALDONE, AL LI PLAĈIS LA IDEO TURNI VIN EN MIAN MALAMIKON. JEN LIA STILO!
ĈIUJ UZIS MIN KIEL PUPON, EKDE LA KOMENCO ĜIS LA FINO. MI HONTAS!
ANDY, NE AMARIĜU! ĈIO FINIĜIS, TIO ESTAS LA PLEJ GRAVA PARTO.
ĈU VERE? KAJ KIE ESTAS LA MONO DE LORDO BLACKBURN?
TOC TOC
ENPAŜU!
JEN LA ĈAMPANO, SINJORO!
LASU TION SUR LA TABLON, MI PETAS.
NI ESTIS MOKE TROMPITAJ, KAJ NI FESTAS TION PER ĈAMPANO! MI JA NENION KOMPRENAS!
VENU, ANDY. MI DEVAS MONTRI AL VI UNU PLIAN AFERON.
SKORZONERO!
LA MONO DE LORDO BLACKBURN EN LA ĜUSTA VALIZETO!
DWIGHT! KION SIGNIFAS TIU ĈI ŜERCAĈO? KIE ESTAS LA MONO?
STULTULO... ĈU TIU DEMONA CROSS TROMPIS VIN?
SED... SINJORO...
SINJORO, NE...
BANG! BANG!
45.


MI DEZIRAS ĈION BONAN AL MURDOCK. MI CERTAS, KE SINJORO LUIGI JAM DISVASTIGIS LA KLAĈON, KE NIA MALNOVA MALAMIKO PERFIDIS ĈIUJN.
INKLUZIVANTE LA HAITIANOJN... ILI NE PERMESOS AL MURDOCK RIPOZI.
PARENTEZE, TIUJ VODUAJ ARTIFIKOJ... ĈIO ESTIS TROMPO, ĈU NE? VI SIMPLE DROGIS MIN.
NE FARU HASTAJN KONKLUDOJN, ANDY. TIUJ MISTERAJ RITOJ ANKORAŬ NE MALKAŜIS ĈIUJN SIAJN SEKRETOJN.
SINJORO CROSS, KIA PLAĈA VIDAĴO!
SED... DIO MIA, SINJORO TEAL!
ĈI-FOJE VI NE POVOS ESKAPI, SINJORO CROSS. ĈU VI NE LEGIS LA ANONCAN AFIŜON? MI PRELEGOS POST LA VESPERMANĜO.
ABEL A·TEAL
"The Cult of Baka"
Myth & Reality
tonight in the dining-room
9 30 p.m.
MI FORIRIS EL NOVJORKO KUN IA AMARECO ĈE LA BUŜO. MI JA DIRIS AL VI, KE LA VIVO DE DETEKTIVO-LERNANTO NE ĈIAM ESTAS GLATA.
FIN